

P A C O k a j J U S T E C O

Monata revuo de la grupo B r u g g e .

Sekcio de Flandra
Ligo Esperantista

.....
 . Prezidanto : Drs F. Roose - J. & M. Sabbestr. 12-Brugge-Tel. 31981 .
 . Sekretariejo : Roose-Dekersgieter, J. & M. Sabbestr. 12, Brugge .
 . Propagando : Maertens Grég., Nieuwstraat, 54, Assebroek .
 . Poŝtkonto : 291429 - Maertens Grég. Assebroek .

LA RAJTOJ DE LA HOMO.

(Prof. G. Verbeke)

(tradukis el Nederlanda
lingvo : E. De Baets)

Estas do ne sen kialo ke Gabriel Martel iras kontraŭbatali la malgajan ekzistokonsideron; ĝi estas ja la vivfilozofio de elradikigataj homoj, kiuj volas konsideri la homan ekziston kiel nekompreneblan kaj sensencan realon. Tie, kie oni malagnoskas al la suferado ĉiun pli profundan signifon, la vivo devas necese montriĝi kiel nesolvebla mistero. Kelkaj popoloj en la Antikva tempo; kredis ke duobla Dieco regas nian ekziston, bonvolema plejpotenculo, kiun ni devas danki pro la feliĉaj okazoj kaj malbonvolema, kiu estas la kaŭzo de ĉiuj akcidentoj kaj mizeroj.

Ambaŭ tiuj Plejpotenculoj al ni donas do sian propran karakteron en nia vivo. Tiu filozofia dualeco nun havas ne plu mal multe da kredanoj : oni pli kredas ke ambaŭ plejpotenculoj nur estas ĥimeroj, al kiuj nur kredas naivaj homoj.

La homo estas konsiderata kiel hazarda kaj malforta harmonio inter fizikaj kaj animaj fortoj, submetiĝita al la blinda fataleco de la monda evoluo.

Cu sufero do ne havas vivvaloron ?

En sia verketo pri la "La senco de la sufero" Max Scheler klopodis montri kiel la suferado necese kuniras kun la seninterrompa renoviĝprocedo; la detruigo de la malnova estas la naskiĝejo de nova vivo kaj estas pro daŭra kaj suferplena reigo ke la vivo restas kaj pliperfektigas. Liaflanke Louis Lavelle atentigas en "Le Mal et la Souffrance" pri la interna pliperfektigo, kiu ekestas pro la sufero, se la homo sin ektenas pozitive. La sufero vekas la homon por la granda realeco de lia ekzisto en la mondo; tiu monda realeco estas ververe regata de la homo; ĝi tamen ne komplete submetiĝas al lia aŭtonomio. La mondo estas por li stranga realeco en kies rondo li sentas sin sola, ĉar ĝi ĉirkaŭas lin kiel senpereblebla mistero. Forpreni ĉiun suferon el la vivo rezultigus ĝeneralan malnuancigon de la homo.

Kiu ne konas la malgrandan verketon de Paul Bourget : "Le sens de la mort" ? Du homojn oni skizas en ĝi : la ĥirurgisto Ortège, kiu malkovras unu tagon ke li havas kanceran ŝvelaĵon sur la pankreaso kaj per pligandiĝantaj kvantoj da morfino laŭgrade mortigas sin; la profunde kredanta oficiro de la franca armeo, Le Gallie, kiu troviĝas ĉiun tagon en mortdanĝero kaj rezistas kuraĝe kontraŭ tiu provo.

Du homoj, du vivkonsideroj; malvalorigo de la homo kaj forteco en malfacilaĵoj aliflanke; respekto por la homo kaj forteco en malfacilaĵoj aliflanke. Tio estas la duobla fenestro de la moderna viro : la kristaneco kun la plej alta estimo por la homaj valoroj kaj kontraŭe malhela ateismo, kiu pro ĝia pasiveco kontraŭ la brutaj batoj de la fatalo mallevigas en malklara pesimismo.

El ĉio, kio antaŭas oni fakte povas konkludi kion ni volas diri per la homa malestimigo; koncernas do tie-ĉi karakterizaĵoj, kiu pli ampleksas ol nur la praktikojn de la nacio-socialisma Germanujo. Tiu malvalorigo ververe iĝas elemento de nia moderna civilizacio, kiés simptomoj troviĝis ĉe ĉiuj popoloj pli malpli. La granda tasko kiu nin atendas ĉe la spirita rekonstruado de nia lando estas la revalorigo de la homo, la reedukado de la homo al tio, kio li estas pro la naturo kaj la dia graco. Tiu revalorigo havas unue materialan aspekton kaj koncernas definitivan gradon de materia bonfarto kiu devas doniĝi al ĉiuj homoj : la privata posedo estas ja garantio por la homa sendependeco kaj signifo de plialtigo de persona digneco. Tiu revalorigo tamen havas precipe spiritan aspekton; rilate al tio, grava funkcio devas ankaŭ esti donita al la kristaneco en la spirita rekonstruado de la "Difektita Mondo". Nur la reveno al la krista opinio de la homo povas restarigi la frakasitan mondon el ĝiaj ruinoj, ĉar nur tie estas akcentigitaj fundamentaj valoroj de la homa personeco per Dia aŭtoritato; tie-ĉi ni trovas la eternan ĉarton de "Les droits de l'homme" kiu devas servi kiel fundamento por la moderna vivo :

1. La homo estas persono t.e. aŭtonoma estaĵo, kiu estas libera kaj sendependa en la mondo por efektiviĝi sian propran vivdestinon. Oni ne povas nei ke la homo estas ligita kun ĝiaj ĉirkaŭaĵoj per sennombreblaj fadenoj, ne nur por satigi kelkajn materiajn bezonojn, sed por konformiĝi al la plej profunda klopodo de ĝia interna vivo. Estas tamen eraro konsideri ĝin kiel puran komunicon, kiu nur havas valoron laŭ grado de ĝia utileco por la ŝtato.
2. La baptito estas ja infano de Dio, envivigita kaj protektita de la Dia Providenco, kiu kondukas kaj regas ĉiujn okazaĵojn de la historio. Dio do ne estas fremda reganto, kiu per senkompata severeco spionas la homajn kondutojn, sed bona Patro, kun kiu ni povas paroli pri la malgrandaj okazaĵoj de nia vivo, kiu helpas kaj subtenas nin en la ĉiutagaj malfacilaĵoj. Li nur petas ke la peco de vivo, kiun ni povis ricevi el Liaj Manoj, pligrandiĝu ĝis io bela, bela artaĵo.
3. La kristaneco estas ankaŭ forto de vivooptimismo; nenio pli kontraŭas la esencon de la kristaneco ol malhela vivkonsidero. Tiu krista optimismo ne nur entenas la ĝojajn okazojn de nia vivo, sed ankaŭ la dolorigajn batojn, kiuj nin trafas; ankaŭ do la sufero havas sian lokon en tiu integrala vivopinio : estas purigo kaj punrepago pro niaj pekoj kaj por tiuj de la tuta homaro.

Tial la kristano ne havas timon pro la vivo : li ne forkuras de la vivo; li akceptas ĝin ĝoje kiel dian donacon kaj portas fiere sian homan dignon.

Fino.

- Voor bedspreien, dekens, dweilen, dameskousen, stopkatoen.

- handdoeken, washandjes, breiwol, enz.... enze.....

- slechts één adres :

- DE COCK - DE KERSGIEFEN,

- Mariastraat, 4, Brugge.

- 5 % vermindering voor esperantisten.

LA HOMO ESTAS REGO.

De S-ano R. Boudens, pastro, o.m.i. (Patroj oblatoj) ni ricevis tiujn-ĉi pensojn kiujn oni utile povas legi en rilato kun la artikolo "La Rajtoj de la homo".

Ne multe gravas scii precize dum kion da jarcentoj la homaro jam ekzistas. Ĉiuj konsentas por aserti ke en la historio de la civilizacio jam mirinda vojo estas trairita. La historio mencias inventojn kaj malkovrojn kiuj miregigas nin. Kia revolucio por la homo paleolitika tempo je unua fojo oni batis fajron el du ŝtonoj kaj karnis kuni la ecojn de tiu potencega elemento. Kia invento kiam unua homo per flosilo veturis sur la akvo. Unue flôsilo, poste boato. La boatoj iĝis pli kaj pli potencaj kaj ili dominaciis sur la maroj kaj spitis ŝtormegojn kaj novaĵ mondoj estis trovataj. Ĉu ni ankoraŭ parolu pri la vaporo kaj ĝia enpraktikigoj ? pri la la staj efektivecoj de la elektriĉo rilate al radio kaj televido ? La progreso de la homa spirito eble plej bone vidiĝas kiam oni rigardas la rezultojn sur la kampo de la rapideco. Jam pasis pluraj miljaroj kiam la Asirianoj ekhavis la ideon meti stangon tra du radoj por deobligi la rapidecon de la movo. Poste venis la ĉaro kaj multajn jarcentojn poste la vagonaro, aŭto, flugmaŝino. La plej ĵusaj inventoj sur tereno de la atomenergio donas al ni la principojn por plialtigi la rapidecon ĝis nepenseblaj normoj, kiuj devos ebligigi al ni transponti planedajn distancojn. Ni akiris tion da potenco super la materio ke nia spirito kaptu niĝas.

Vere : la homo estas kreita por mastri la materion. La menso distingas lin de la besto kaj per tiu menso li faras efektivecon kiuj metas en ombro ĉiujn efektivecojn de bestoj. Aglo flugas alten ĝis 3.000 metroj; kolombo kapablas al vojaĝo de 1.000 km.; ĉevalo kapablas kuri je 50 km. po horo. Sed la homo, kiu konstruis flugmaŝinojn, moviĝas per ili tra la aero, pli alte, pli rapide kaj pli longe. La homo estas reĝo.

Kaj tamen oni havas la impreson ke li ne konscias pri tio. Tiuj kiuj ankoraŭ vere sentas sin reĝo estas maloftaj kaj tiuj kiuj vere estas ankoraŭ, pli maloftaj. Kion da homoj fakte estas sklavoĵ? Kion da homoj oni trovas, kiuj englutas ĉion kion iliaj ĵurnaloj instruas, sen ia persona pensado kaj sen la plej malgranda kontraŭaĝo; homoj kiuj estas greĝo-homoj; ne kapablaj por juĝi kiel personecoj, pri tio kio devus esti submetita al ili. Kion da homoj kapablas kontraŭigi la ritmojn de diabla Jazz-muziko ? Kion da homoj povas ordoni al sia korpo ?

Tro multaj lasis sin kapti de la sovaĝa urbo-vivo kaj de la nenatureco de la hodiaŭaj socialaj rilatoj.

La raciigo de la laboro (Taylor sistemo, k.t.p.) estas malbeno kontraŭ la homa indeco. Kio la homo ankoraŭ estas pli ol maŝino kiu ĉiam aŭtomate faras la saman movadon; tiamaniere, ke, se tio daŭras longe, ĝi iĝas obsedo (vidu la filmon "Modernaj Tempoĵ" de Charles Chaplin (1)). Kiamaniere oni volas ke tiuj homoj anas sian laboron kaj igas sin estroj je ĝi kiam tiamaniere ili estas ĉiam recitataj de sia laboro. Kaj kiam ili ankoraŭ estas devigataj kvankam ĝi nur estas morala devo - loĝi en la domoj de sia laboradanto, viziti liajn kinematografejojn, enskribi en lia asekurasocio k.t.p. tiam ilia libereco tute estas for.

Tro Al. Carrel en sia libro : "L'homme cet inconnu" tre bone diras: "Nek la gigantaj fabrikoj, nek la "office-buildings" kiuj ĉielenlariĝas, nek la grandaj mortigantaj urboj, nek la industria moralo, nek la mistiko de la produktado estas necesaj por nia progreso". Aliaj manieroj de ekzistado kaj de civilizado estas eblaj. La kulturo sen komforto, la beleco sen lukso, la maŝino sen la servuteco al la fabriko, la scienco sen kulto de la materio permesas al la homoj evoluiĝi senhalte, konservante sian inteligentecon, sian moralan menson kaj sian virecon.

La reĝeco de la homo nur eblas, kiam li ne sin lasas regita de la materio. La progreso de la spirito ne kapablas akompani la progreson de la tekniko.

Ni denove devas iĝi mastroj de la kreitaĵoj, ĉirkaŭ ni.
"Ni povas ĝin, diras A. de Saint Exupery ("Terre des Hommes"-
5a ĉapitro) kian ni ne pli da intereso taksas al la maŝino, ol
la kamparano al sia plugilo, nome la intereso de ilo, de rimedo :
"La machine n'est pas un but, l'avion n'est pas un but, c'est un
outil. Un outil comme la charrue". (la maŝino ne estas celo; la
aviadilo ne estas celo, ĝi estas ilo; ilo kiel plugilo estas ilo).

Ne estas facile havi tian vivsupervidon. Gi demandas tutan
edukadon. Kiu vivas malalte apude la tero, ne akceptas pli altajn
valorojn, kaj ne kredas al idealoj, restas kaptita de la materio
kaj maltrafas sian destinton de homo. Li pretigas al si sklavanimon
kaj forgesas ke li estas destinita por esti reĝo ?

El la nederlanda tradukis Jozef Roels.

Wist ge ?

-dat het grootste landvliegtuig ter wereld de XC99
zal zijn. Het zal 400 soldaten (of 335 gekwetsten)
kunnen vervoeren en dat met een actieradius van
13.000 km.

-dat "Vectolite" een nieuw product is van de Gen.
Elect. Comp. dat :

1. magnetisch
2. niet-metaal
3. niet geleidend is.

Het is een verharde substantie waarin vooral ijzer-
roest en cobaltoxyde voorkomen.

-dat de "Trieste" die één der grootste verzekerings-
maatschappijen is, reeds 116 jaar bestaat ?

Voor inlichtingen : wendt U tot

R. Witvoet,
Baron Ruzettelaan,
Assebroek-Brugge.

ANGULO DE LA SERĈEMULOJ.

Ĝar nur malmultaj ensendis la solvojn de la antaŭaj
enigmoj, ni plilongigas la ensendperiodon ĝis la 15-a de
Novembro venonta.

En tiu tempo kiu estas jam tre proksima al la vintro, ne plu multe estas florantaj plantoj. Oni ankoraŭ renkontas verdajn plantojn, kiuj nun portas la fruktojn de ka fora somero. Ii ekzemple renkontas nun la Impatiens Noli-tangere, (Springzaad - lit.-Saltfrukto) kiu jam pendigas siajn foliojn kaj profitas de la lastaj sunradioj por forpafi siajn fruktojn; tio estas vere stranga afero. Kiam oni tuŝas al la frukto, fulmrapide la eksteraj partoj de la frukto ruliĝas kaj ĵetas ĉiu-flanken la nigrajn semojn. De tie venas do la latina kaj la franca nomo "Impatiente n'y touchez pas". La planto estis pli frue uzata kiel sangpuriganta medicino, kaj kiel vomiga rinedo sed nun ne plu ĉar ŝajnas ke ĝi ne estas sen danĝero.

Oni ankoraŭ trovas nun la Bingelkruid (Mercurialis Anua - franca : Mercuriale annuelle - germana : Jähriges Bingelkraut). Kiam oni havas du plantojn oni povas vidi malsamecon inter la du. Ili bone ambaŭ havas la samajn foliojn sed la unua havas fruktojn kiuj fiksiĝas facile al la vestaĵoj kaj la dua posedas ankoraŭ floretojn kun grandaj stamenoj. La "Bingelkruid" do ne havas du specojn da plantoj : la vira kaj la ina planto. La popolnomo de la planto al mi multe diras : "Schijtkruid" - "Stinkerskruid" - do malbonodora planto. Pli frue oni manĝis la planton; nun ankoraŭ oni manĝas ĝin en Germanujo kiel spinacon. Estas ankoraŭ sangpuriganta planto.

Cie ankoraŭ troviĝas la platanoj. Ili kreskas rapide kaj havas grandegan foliaron. Tial ili estas plantataj en parkoj kaj vojoj. La frukto estas nusko (sferforma). En la printempo falas de la novaj branĉoj kaj burĝenoj, malgrandaj haretoj kiuj tiklas sur la okuloj kaj en la pulmoj. La plej simpla metodo por scii ĉu estas platano, estas la konstato ke en la aŭtuno la ŝelo de falas de la trunko. La plej granda platano de la mondo estas tiu de Bujukdere apud Konstantinopel, kun trunko de 50 m. da ĉirkaŭo. En la ombro de tiu arbo povis resti la tuta armeo de Godfried van Bouillon.

La plej kutime trovata platano ĉe ni estas la okcidenta-platano (Platanus occidentalis) kiu malsimilas de la orienta platano en ĝiaj folioj. La folioj de la orienta platano estas entranĉataj sur la flanko ĝis al la nezo.

Laŭlonge de la eksfortikaĵoj de nia bela urbo Bruĝo ankoraŭ multe troviĝas kultivitaj plantoj kiuj meritas nian atenton. Ekzemple se oni iras de la Ezelpoort (Azena pordego) al nia salono (Forĝista pordego) laŭlonge de la akvo tie vi trovos la Hoerascypres (narĉo-cipreso) speco de konifero sed kiu perdas la foliaron en la aŭtuno. (Taxodium distichum)

Sekvas la Taksus (Taxus Baccata) kun venenaj fruktoj kaj folioj. Nur la mantelo de la frukto kiu estas tre bela en formo de sonorileto kaj kiu estas ŝajnbero estas manĝebla de la birdoj kiuj tiamaniere dismetas la semon. La popolnomo parolas pri : Spaansch hout - Spaansch groen - Spaansche hagen (Hispana ligno - hispana verdo - hispana heĝo).

Tiam oni ĉie vidas tre tiujn blankajn berojn kiuj venas de la Sneeuwbes - Neĝbero - (Symphoricarpos racemosus). La planto venas el Canada kaj Kalifornië. Tiu planto kiu estas bone rimark-ebla ricevas de la popolo la nomon : Berstbezen (fendberoj), Eikensboom (ovetarbo, Eike (ovetoj), Knekkers (globeto), Harbol Poefkens, Schieterkens (pafiletoj), Sneeuwbollekens (neĝglobetoj), Sneuwbollen, Witte Bollekes (blankaj globetoj); do tre multe da nomoj por la sama ideo.

En la Aŭgusta numero 1947 de la Meksika revuo "Renovigo" ni legis la ĉi sekvantan pripensindan ĉefartikolon, verŝajne redaktitan de ĝia direktoro - S-ano Jesus Amaya :

R. E. A. L. O.
-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

DUM LA VIVO esperantista reaperas malrapide, la malnovaj idealoj, la malnovaj iluzioj sin montras denove, eĉ se kelkaj el ili iom modifitaj pro la dolorigaj spertoj.

Elstaranta idealo - k iluzio - estas atingi la oficialan alprenon de Esperanto, t.e., ke la registaroj ĝin agnoskos kiel helpan internacian lingvon, k enkondukos ĝin en la superajn lernejojn.

Laŭ la racio, tio estus klare logika, simpla afero. Tamen, ne estas la racio la ĉefa movigilo de la agado de registaroj, sed la pasio, tiu multaspekta sento kiu same instigos al heroaj agoj aŭ la subpremado, mortigo k detruado.

La registaroj, eĉ la progresemaj, estas konstituitaj de pasiemuloj kies menso estas jam fiksita k petriĝinta en unu direkton : la protekto, defendo k fomento de la interesoj de difinita grupo da homoj al kiu ili apartenas. La kontraŭo estas maloftaĵo rimarkinda.

Rilate la lingvajn aferojn, estas du la sintenoj kiujn povas adopti la registaroj : 1e - Se la lando k ties enloĝantaro estas sufiĉe grandaj, la oficialaj klopodoj ĉiam celos konservi k disvastigi la enlandan lingvon. 2e - Se lando k enloĝantaro estas malgrandaj k malfortaj, la registaro, rezignita je ĝia sorto, favoras la disvastigon de la lingvo parolata de granda k povhava lando.

La esperantistaro ne forgesu tiun amaran veron. Tamen, oni devas daŭrigi la klopodojn ĉiuspecajn por antaŭenpuŝi la esperantan aferon, ĉar ĉiu venko estos progreso. En la registarajn postenojn eniras foje progresemaj, homaramaj homoj kiuj povas helpi. Ni profitu je la ŝancoj, sed sen multe iluziigi, ĉar la esperantismo estas realista idealismo.



GESAMIDEANOJ :



Por riparado de viaj ŝuoj, nur unu adreso :

HUBERT VAN ROOSEBEKE, Calvariebergstraat, 8,
Brugge.

5 % da rabato !




DEVENO DE LA VORTOJ.



(el la Marta numero 1947 de "Kompreni")

BANKROTO : El la itala lingvo banco (benko) kaj roto (rompita). La mezepokaj italaj bankistoj montris la nomerojn vendotajn sur benkoj instalitaj sur la vojoj. Kiam bankisto estis tro malhonesto (ĉar neniam ekzistis honesta bankisto) oni simbole rompita la benkon.

LOMBARDO : (Konprunto, kontraŭ movebla garantiaĵo). - Tiu termino venas de la nomo de la loĝantoj de Lombardio (itala provinco) kiuj estis aktivaj monpruntistoj.



ADVENTMEDITADOJ DE ESPERANTISTO.

Advento, la tempo sanktigita de ĉian, la tempo de la malholo, trankviligo, rememoro kaj meditado. Preterpasis la aŭtuno kun sia abundo da donacaĵoj kaj sia multekolora, riĉega foliara pompo, kun kiu ĝi iris ornamita kaj armita venkonte al la morto.

Kaj la vintro envenis. Malmildaj ventegoj kaj glaciaj pluvecoj plenigas la aeron. Tamen, ion post ion, silentiĝas la vivado kaj agado kaj anstataŭ de ili ekestas la murmurado kaj flustrado de la arbaroj kaj animoj.

Tio estas la tempo, en kiu ni hejmenportas el la arbaro la ĉian verdajn abiobranĉojn, por ornami nian domon aŭ plekti adventkronon.

Tio estas la tempo de la rememoro kaj meditado. Trankvilaj ni iĝas, tute trankvilaj, kaj io mistika, emocias nian bruston kaj liberigas nin dumhore de la zorgoj kaj ŝarĝoj de la ĉiutaga vivo.

En la duonlumo de la finiĝantaj tagoj, se ĉiuj formoj perdas siajn akrajn konturojn, ŝanĝiĝas kaj ĉiam denove ŝanĝiĝas malstreĉiĝas korpo kaj animo, kaj la io mistika de la fabelsorĉo el la infaneco, la revoj pri feliĉo kaj paco fugas el la pasinteco kaj ĉio reflektas en la hela brilo de niaj okuloj. Preskaŭ sveninte per la multa surtera mizero nia rigardo vaga das en la senlimon de senvoluna kaj sentempa estanteo, en la vastan landon de niaj sopiro kaj amo neniam kontentigitaj. Kaj novaj forto kaj volo ekfermas el la profunda fundo de nia animo kaj donas al ni novan vivenergion.

Kaj super ĉio lumas en radianta brilo la "Verda Stelo" de la espero, fariĝante al ni vojonontrilo en la sopiratan landon de la amo kaj interfratiĝo. Feliĉe estas tiu, kiu kapablas sin fordoni al la sorĉo de ĉi-tiu plimalgrandiĝanta luno de la vintronokto kaj ĉin komprenas gardi. Ĉiam vivante konscize en la leĝo, li ne timas nek morton nek aliformiĝon. Por li sekvas post ĉiu vintro kun ĝia mortado, printempo ĉion reviviganta kaj post ĉiu ajn katastrofo ruiniginta nova evolucio.

De Esperantisto el Köln-Pall, Weingarten, 28.

El : "Feuillets encyclopédiques de Documentation espérantiste, Sie OPINIONS & VOEUX " Série G, ni legis :

F^o 4I - n^o 4. CELESTIN ROUSSEAU - Pharmacien, auteur du Vade-Mecum de Pharmacie Internationale :

"Le problème de la langue auxiliaire sera résolu le jour où un ou deux Etats introduiront son enseignement dans les programmes des écoles à titre obligatoire. Cette réforme est désirable et nécessaire pour créer une mentalité nouvelle, susceptible de développer le sentiment de solidarité que commande la conversation de la communauté européenne. La France se doit à elle-même et doit à ses traditions séculaires d'apôtre des grands progrès de ne laisser à aucune autre nation cette initiative dont les conséquences à peine prévisibles pourront être comparées à celles qui suivirent l'invention de l'imprimerie".